LVP

**PILO-PRESS**

Internacia
Informservo

N-ro 29/75 4 aŭg 1975
Aperas ĉiusemajne

Dum la aŭgustaj Esperanto-Ekspresoj Pola Radio disaŭdigas sonraportojn pri la 60a UK.

Aŭskultu kaj skribu!

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Kongreso - fruktedona, harmonia, suna, novstilo

Kopenhago (pp) La 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago finiĝis. Unu el la partoprenantoj, Hermann Behrmann, komentis la kongreson per jenaj frazoj: "La kongreso en Kopenhago estis ege fruktedona, harmonia, suna, novstila. Ĝi plaĉis al ĉiuj!"

La ferma kunsido okazis sabate, matene, je la 2a de aŭgusto. La ferman kunsidon ĉeestis du diplomatoj, nome reprezentantoj de FR Germanio kaj de Sovetunio. La prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin menciis ankaŭ kelkajn salutojn, kiuj atingis la kongreson, i.a. tiun de la aŭstria ŝtatprezidento, d-ro R. Kirchschlager.

La vicprezidanto de UEA, d-ro Werner Bormann, laŭtlegis la du kongresajn rezoluciojn, kiujn ni publikigas aliloke.

Dum la ferma kunsido d-ro Humphrey Tonkin diris i.a. jenon:

"Fariĝis sufiĉe mode lastatempe demandi al si kion pensos la historiistoj pri tiu aŭ alia evento. Mi demandas min kiel efektive epitetos ili la nunan kongreson?

Eble oni nomas la nunan kongreson la suna kongreso. Ĉar efektive la suno sufiĉe ofte brilis, eĉ en malseka Kopenhago!

Eble oni nomas ĝin la amika kongreso. Ĉar al mi ŝajnas ke en tiu ĉi kongreso efektive estas atmosfero de amikeco. La homoj bone traktas unu la alian kaj la homoj ĝuas esti ĉi tie. Efektive ili ĝojas esti ĉi tie ke eble la historiistoj nomas ĝin la longdaŭra kongreso. Multe homoj venis jam vendrede, kaj mi konstatas, ke multaj homoj ne jam foriris.

Eble oni nomas ĝin tamen la harmonia kongreso. Tiurilate mi menciu, ke kvankam regas harmonio ĉi tie en niaj rondoj, ankoraŭ restas kelkaj homoj kiuj estas kvazaŭ ekster tiuj rondoj. En la komitato oni faris proponon aŭ ni akceptis rezolucion laŭ kiu oni etendis la manon al ĉiuj esperantistoj kunlabori kun UEA kaj etendis la manon por reakcepti ĉiujn homojn en UEA tiam kiam la tempo fariĝas taŭga por ili. Kaj mi kun granda sincero alvokas al tiuj homoj reveni en niajn rangojn. Mi bonvenigos ilin, absolute bonvenigos ilin. Kaj cetere kiel mi diris kelkfoje antaŭe ni ne povas entute ĝui la lukson de internaj bataloj, ĉar estas tro grava laboro, kiun ni devas fari.

Eble oni nomas ĉi tiun kongreson la labora kongreso. Pri la komitatkunsidoj oni jam raportis al vi. Ankaŭ ili daŭris longe, sed ili estis se mi rajtas tion diri, ne kutime fruktedonaj. Ni efektive traboris amason da laboro, faris amason da novaj decidoj kaj entute laŭ mi prenis tre bone la regon de la asocio, tiel ke ĝi efektive iras antaŭen kun pli da forto ol ni havis kiam ni venis ĉi tien.

Entute mi ankaŭ aparte gratulas al vi ĉiuj pro tio ke la diversaj laboraj kunsidoj de la nuna kongreso estis nekutime multnombre ĉeestataj kaj multaj el vi efektive partoprenis en la diversaj diskutoj. Pri tio ankaŭ mi estas tre dankaj ĉar tio montras la vivantecon de nia asocio.

Kaj fine oni eble nomas la nunan kongreson la <u>refortiga kongreso</u>. Ofte oni venas al kongresoj kun iom da kuraĝo kaj foriras de kongresoj kun iom da laco. Multaj el vi venis al la nuna kongreso kun duboj. Mi kredas ke malmultaj foriros kun duboj. Ni fakte regajnis nian fortecon, ni regajnis nian celkonscion kaj ni konas la vojon kiun ni devas sekvi. Mi petas al vi ke vi ĉiuj iru hejmen kun novaj fortoj, ke vi raportu pri la kongreso al viaj kolegoj kaj amikoj kaj rakontu al ili la veron pri niaj kongresoj kaj speciale pri la nuna kongreso, ĉar nur per la vero oni povas esti juĝata.

Kaj fine mi diras dankon. Mi ne diras dankon al vi, sed diras dankon por vi. Ĉar finfine ni ĉiuj devas danki unu al la alia laŭ la atmosfero de la nuna kongreso kaj por la laboro farita dum la nuna kongreso kajankaŭ la planoj por la estonteco.

Ne estas tiel ke unu el la membroj dankas al la ceteroj. Sed, ke ni ĉiuj dankas unu la alian. Ĉar finfine ĉiuj ni kaj ankaŭ aliaj konsistigas nian movadon kaj kune laboras por la sama celo. Tiu celo estas nobla kaj necesa por la homaro."

<u>Rimarko:</u> La ĉi-supran citaĵon el la ferma parolado de la prezidanto de UEA Pilo-Press notis laŭ la sonraportaĵo de Pola Radio dum la Esperanto-Ekspreso de la 3/4 de aŭgusto.

*************

<u>Rezolucioj de la UEA-komitato</u>

La komitato de UEA akceptis du rezoluciojn. Ili estas:

1) La komitato de UEA deklaras, ke la politika neŭtraleco de UEA estas kaj restos neŝancelebla.

La komitato de UEA unuanime akceptis rezolucion, en kiu ĝi deklaras, ke okazis neniu ŝanĝo en la fundamenta gvidprincipo de UEA, ĝia politika neŭtraleco. La rezolucio tekstas laŭvorte jene:

"La komitato de UEA en siaj kunsidoj en Kopenhago dum la 60a Universala Kongreso de Esperanto de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1975 k o n s t a t i s

ke lastatempe aperis en pluraj naciaj ĵurnaloj artikoloj, en kiuj oni kontestas la politikan neŭtralecon de Universala Esperanto-Asocio

d e k l a r a s

ke al tiuj diskonigoj kaj gravaj akuzoj mankas ĉia bazo de vero kaj ke ne ekzistas unu sola pruvo, kiu pravigus tiajn misprezentojn,

ke la politika neŭtraleco de UEA, kiel ĝi estas priskribita en la artikoloj 4 kaj 13 de ĝia statuto, ĉiam estis kaj ĉiam restos la fundamenta gvidprincipo de ĝia tutmonda agado kaj daŭre konsistigas la neŝanceleblan bazon de ĝia ekzistado,

ke la Asocio estas preta kunlabori kun ĉiuj fortoj strebantaj al unueca komuna celo,

r e k o m e n d a s

ke la estraro kaj la redaktoro de Revuo Esperanto evitu diskutojn pri la longe diskutitaj faktoj kaj pri la personecoj de nunaj aŭ antaŭaj gvidantoj de la Movado,

p e t a s

ke tiu ĉi deklaro estu vastskale diskonigata per ĉiuj taŭgaj rimedoj de informado."

## 2) Propono de la Komitato de UEA al la Sekureca Konferenco en Helsinki

Dum sia kunsido de la 30a de julio 1975, la Komitato de UEA decidis pri la jena rezolucio:

La Komitato de Universala Esperanto-Asocio, supera gvida instanco de la organizaĵo, kunveninta en Kopenhago dum la 60a Universala Kongreso de Esperanto, kun plena intereso kaj apogo atentante la laboron de la Eŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro,

KONSTATINTE

1. ke la ĉiam kreskanta problemo de multlingveco grave bremsas la liberiĝon kaj plivastiĝon de la kunlaboro celata de la Konferenco, kiel evidentiĝas eĉ per la komplikaĵoj prepari identajn tekstojn de la konferenca rezolucio en ses lingvoj;

2. ke la problemo de multlingveco aparte akre aperas en la kampo de personaj kaj neoficialaj rilatoj, kies signifon speciale atentas la Konferenco;

3. ke justa, egalrajtiga kaj adekvata solvo de ĉi tiu problemo povas troviĝi nur en ĝenerala adopto de internacia planlingvo, kiel jam dum jardekoj pruvis la ĉiukampa funkciado de la internacia lingvo Esperanto;

prenante en konsideron la samteman rezolucion akceptitan dum la 58a Universala Kongreso de Esperanto en Beograd, 1973;

PROPONAS

ke la komitato de registaraj ekspertoj, kiuj kontrolos la realigadon de la konferencaj decidoj, pozitive konsideru la jam entreprenitajn paŝojn por apliki Esperanton en sociaj, politikaj kaj sciencaj medioj (parlamentoj, partioj, sindikatoj, universitatoj) kaj helpu al plejeble vasta antaŭenigo de tiuj klopodoj.

### Komisiono de eksteraj rilatoj de UEA

Kunvenis la membroj de la Komisiono, G. Leon Smith, Ib Schleicher, J. Uŝpieński, sub la prezido de la gvidanto, d-ro Tonkin; ĉeestis kelkaj observantoj. Rezulte de la diskuto oni faris jenajn decidojn:

La Parlamenta Agado estas grava agadkampo de UEA, sed la rekta aliro al parlamentoj estas en la kadro de la taskoj de la Landaj Asocioj. Tamen, tre grava rolo de UEA en tiu ĉi sfero konsistas en konforma informa laboro kaj agado ĉe internaciaj registaraj organizaĵoj. Estis prezentita projekto pri starigo de Parlamenta Informservo (Informcentro). Dum la kunveno oni fondis laborgrupon por prilaboro de pli preciza plano de la Parlamenta Agado, ankoraŭ dum la Kongreso. Pri la agado ĉe partioj, tio ĉi same apartenas al la taskoj de LA; UEA tiurilate devus prilabori taŭgan informan materialon, peri informojn kaj iniciatojn. La konstatitan mankon de scio pri tiuj ĉi agadoj la estraro de UEA, laŭ peto de la Komisiono, forigu per specialaj renkontiĝoj, eldonaĵoj, laborprogramoj ktp. UEA ankaŭ subtenu la regionan agadon ĉe registaraj organizaĵoj.

Oni konstatis bonan kaj promesplenan reestablon de la kunlaboro kun Unesko, per la starigo de komisiono por kunlaboro kun Unesko en Parizo. Laŭ propono de d-ro Tonkin, oni decidis fondi similan komisionon por agado en UN kiel tuto; tiu ĉi estonte devus transformiĝi en memstaran, kvazaŭ fakan asocion por UN en la kadro de la Esperanto-movado.

Raportis J. Uŝpieński

## Du kongresaj rezolucioj prezentitaj dum la solena fermo de la kongreso

En sia lasta kunsido en la sabata mateno (1975-08-02) la komitato de UEA akceptis du kongresajn rezoluciojn, kiujn la vicprezidanto dro W Bormann prezentis al la kongresanoj dum la solena fermo de la kongreso.

La unua temis pri la kongresa temo "Virino" kaj tekstas jene:

"La 60a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazas en Kopenhago de 26 julio ĝis 2 aŭgusto 1975, diskutinte la socian pozicion de la virino sub la ĝenerala temo "La Virino"
notas kun aprobo la agadon de Unuiĝintaj Nacioj kaj ties specialigitaj organizaĵoj por plifortigi la rajtojn kaj pozicion de la virino,
konstatas ke malhelpoj al egalrajteco en la diversaj landoj estas ofte sociaj kaj kulturaj, do ne nur juraj malhelpoj,
alvokas al ĉiuj partoj de la esperntomovado studi tiun ĉi problemon ka kaj entrepreni paŝojn por akceli la atingon de egalrajteco jura, socia socia kaj kultura, kaj antaŭenigi la rolon de la virino en la gvidado de la esperanto-movado,
kaj atentigas pri la avantaĝoj d e la Internacia Lingvo Esperanto kiel perilo de konstrua diskutado pri tiu kaj alia sociaj kaj kulturaj demandoj."

La dua rezolucio temis pri la rolo de la individuo en la esperanto-movado. Jen ĝi:

"La 60-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazas en Kopenhago de 26 julio ĝis 2 aŭgusto 1975, diskutis la temon "La rolo de la individuo en la Esperanto-movado", kaj faris la jenajn konstatojn.

1. La estontaj prospero kaj sukceso de la Esperanto-movado grandparte dependas de ĝia efika utiligo de volontulaj fortoj.
2. Efika planado de estontaj aktivecoj postulas partoprenon de kiel eble plej vasta parto de la Esperanto-publiko, kiu libere kontribuu siajn ideojn kaj per tio ankaŭ sentu respondecon pri decidoj faritaj.
3. Efika interna regado de la diversaj Esperanto-organizoj postulas kiel eble plej demokratajn organojn kaj kiel eble plej bonan utiligon de la homaj talentoj.
4. Ofte malhelpas efikan partoprenon en la Esperanto-movado la geografia izoliteco kaj la ekzisto de organizaj strukturoj ne plene respondaj al la bezonoj de la unuopaj membroj.

Sekve la kongreso prezentas la jenajn rekomendojn.

1. La diversaj Esperanto-organizaĵoj faru ĉion eblan por certigi maksimuman aktivan partoprenon de la ordinara membraro en la planado kaj agado de tiuj organizaĵoj;
2. La diversaj Esperanto-organizaĵoj ekzamenu siajn strukturojn por certigi kiel eble plej demokratan funkciadon;
3. Esperanto-kongresoj kaj konferencoj celu aktive partoprenigi la ĉeestantojn kaj efektive liveri al ili forumojn por iliaj ideoj;
4. La unuopaj membroj trovu vojojn por proponi siajn servojn al la Esperanto-movado kiel volontuloj, ekzemple per la Volontula Servo de UEA.

Noto: Rapide kaj modele laboris la Kongresa Gazetara Servo. Pilo-Press jam ricevis la entute 36 paĝojn de la eldonitaj bultenoj. La ĉi-supre publikigitaj rezolucioj devenas de la Gazetara Servo.
Redaktoroj de Kongresa Gazetara Servo estis Ulrich Lins kaj Franko Luin.